

Gilbert R. Ledon

VIRUSOJ

(kvar teatraĵetoj)

La vivo, la homo, la socio
estas tiaj:
drastaj, abruptaj, akraj.

La rutina vivo inside nin ĉirkaŭas,
mallarĝigas nian vidon,
tiel ke ofte ni forgesas nian idealon,
niajn proprajn homajn kondiĉojn.

En ĉi tiu libreto vi povos spekti
etajn scenojn el la grandaj virusoj
kiuj plagas nian socion.



Gilbert R. Ledon



VIRUSOJ

La paranojulo
Viktimoj
Niaj patriotoj
Ĉe la burokratejo



**KVAR
TEATRAĴETOJ**



VIRUSOJ

La paranojulo
Viktimoj
Niaj patriotoj
Ĉe la burokratejo

Verkoj kaj eldonoj de la aŭtoro:

Satana Anĝelo (trilingva: Esperanto / franca / portugala) – 1983.

– socia kritiko – membiografio.

Moderna Mito: La Kolektiveco – 1986.

– filozofia eseo.

Sennaciece tra nia mondo – 1989.

– siaspica vojaĝlibro.

Al la tero returne – 1992.

– unu solvo por la homaj sociaj problemoj.

Teknikaj Kajeroj – 1996/1997/1999.

– pri personaj spertoj.

A) Manekenoj kaj Ni

B) Hermetikaj pumpiloj

C) Anarkia konstruo

Ĉ) Familia lingvo = Esperanto

D) Ikaro ne sonĝis

Analoj de EASP – 1997.

– 60 jaroj sub steloflagrado

Pliaj eldonoj:

Karuseloj... de Sara Larbar – 1987.

La Evangelio de la Horo – de Paul Berthelot – 1990.

Florville kaj Courval – de Markizo de Sade – 1992.

Kiel kuiru sen viando – de Clara de Hess – 1998.

– kunlabore kun Fonto.

La disvendado de ĉi tiu eldono, fare de esperantistaj libro-servoj

aŭ organizaĵoj ne celas profiton por la eldonanto sed helpon al la diskonigado kaj vivigado de la homa kulturo per Esperanto.

Vendoprezco de ĉiu ekzemplero, maksimume: USD 4,00.

© Verko sen aŭtorrajtoj.

GILBERT R. LEDON

VIRUSOJ

La paranojulo
Viktimoj
Niaj patriotoj
Ĉe la burokratejo

1999

Eldono de la aŭtoro

Historiaj notoj

Mi ĵus retrovis, post 45 jaroj, la manuskripton de tiuj «Virusoj», kiun mi vere, entute estis forgesinta. Mi evidente eklegis la aferon por refreŝigi mian memoron, antaŭ ol forĵeti la flavigintan paperon. Sed jen, tion mi ne faris, ĉar mi konstatis, ke mia «idealo», mia maniero taksi la mondon dum tiu preskaŭa duonjarcento ne ŝanĝiĝis, kaj tio estis ia debuto en mia verkado... Sed teatraĵoj!... Amuze, ĉu ne? des pli ke mi estas nek bona aktoro, nek asjdua spektanto... maksimume socia klaŭno mi estas, kiel ĉiuj.

En 1955 mi submetis tiun manuskripton por taksado al la eterna junulo kun «juneca ardo»¹, la tiam konata «mallongpantalono» de SAT, t.e. Norbert Bartelmes. La rezulto de la aprecado estis senkuraĝiga: «Verko ne sufiĉe literatureca, drastaj terminoj, abruptaj formuloj, troa simplismo», ktp. Restis nur unu solvo: flanken ŝoti la fatrason kaj forgesi tiun aventuron, kio okazis ĝis nun.

¹ «Junececa Ardo» kaj «Ne plu ludo» estas rakontoj de tiama redaktoro, recenzisto de *Sennaciulo* Norbert Bartelmes (Barthelmeŝ) ankaŭ verkisto de romano *Vartejoj* kaj tradukisto de *Faŭsto* (de Goethe).

Tamen, kio estas io literatureca, ĉu nur komplikaj esprimoj kaj parolturnoj, teksto farĉita de hidaj aŭ lindaj neologismoj? Kial anstataŭ simplismo devas regi komplikismo? Cetere mi ŝategas simplismon, tial dum mia tuta vivo mi intence min esprimis per simplaj sed drastaj kaj abruptaj formuloj, kiuj vundas la konformismon. La vivo, la homo, la socio estas tiaj: drastaj, abruptaj, akraj.

Tiel dum la relego de miaj «Virusoj» mi decidis senŝanĝe aperigi ilin ĉar ili estas entute aktualaj.

La legantoj, kiuj samopinios kiel Norbert Bartelmes, bonvolu senkulpigi min.

Gilbert R. Ledon

Marto 1999

Enkonduko

La rutina vivo inside nin ĉirkaŭas, mallarĝigas nian vidon, tiel ke ofte ni forgesas nian idealon, niajn proprajn homajn kondiĉojn. Tiu senkonscia brutiĝo fariĝas tiel grava, ke ni, en la areno vastega de la ekzisto, eĉ ne scias plu pesi, taksi. Ni ludas nian aŭtomatan rolon, ja imitante perfektan aktoron, sed bedaŭrinde la scenojn ni ne enkamigas laŭ la spirito de la aŭtoro!... Tio estas, laŭ niaj raciaj, deveno, evoluo, tuta ekzistado.

Tial, kiuj bonvolos perdi horeton el sia kutima vivmimiko por iel spekti ĉi tiujn etajn scenojn de kelkaj el la grandaj virusoj kiuj plagas nian socion, tiuj eble rekonscios, ke ĉio ne estas perdita, ke ni devas foriĝi el nia letargio kaj ke ankoraŭ restas ioma batalo por soci-hom-perfektecon atingi.

Tio estas mia tutkora sopiro.

La aŭtoro

Brazilio, oktobro 1955

LA PARANOJULO

Personoj:

Petro: La paranojulo.

Ŝi: La edzino de la paranojulo.

Giĉjo: La infano de la paranojulo.

Sceno 1

(Simpla kampara, komuna ĉambro. – Tablo en la mezo, kie la bubo manĝas kaj ludas per paneroj. En angulo, lavujo, kie virino, Ŝi, laboras.)

Ŝi: Petro, ĉu vi bonvolos ellitiĝi hodiaŭ? Jam la naŭa forpasis kaj sola mi laboras... Kiel ĉiam, cetero! *(al si mem)* Dudek jarojn tiel mi travivis. Sklave en laboro mi eluzas miajn fortojn, por kia celo, kia motivo, plezuro?... Li, ĉiam malsana... nervoj, stomako... kaj tiu ĵaluzo!... eterna turmento.

(Ŝi rigardas subite al la bubo.)

Apenaŭ mi rajtas iri ĝis la magazeno, la riproĉoj plukas dum horoj. Mi ne povas agi. Kvazaŭ najlumita mi streĉe ekzistaĉas. Ha! mia anĝelo, se mi ne havus vin!... Vi, mia kara bubo, tiom senkulpa... Mi scias, Giĉjo, via patro ne kulpas, li tre sobre vivas. Ho ve! Tiel ne estis je via praavo, kiam boteloj da vino postsekvis pakojojn da alkoholo, pakojn da tabako.

(Ŝi prenas la infanon en la brakojn.)

Kaj nun, mia karega, kiel sekvo al la bonaj agoj, familiaj plagoj persistas, neniigas ĉiujn, iom post iom, kancere... Jen tuberkulozo, jen

frenezo, jen kor-nervomalsanoj; ok gefilojn li al via praavino naskigis, ok fokusojn de degenero. (*kortuŝe*) Diru al via panjo, Giĉjo! Vi ĉiam kondutos bone, konscie, vi ĉiam restos sobra, homa... kaj tiel... vi restos ĉiam bela, forta, ĉu ne?

Giĉjo: Jes, panjo mia, kial ne?

Ŝi: (*Ŝi residigas la bubon.*) Ha, mia karega, mi timas tiun tagon... piedmalvarma statis via patro, tutnokte... li apenaŭ dormis horeton kaj nerve saltegis, kvazaŭ elektrizita!... Estas krizo. (*Al la edzo alvoke.*)

Petro, ĉu vi venas? Mi jam plenumis preskaŭ la tutan laboron: la porkoj manĝis, la kokinoj ricevis sian porcion, via matenmanĝo, preta en la bovlo, vin atendas ĉe la fajrujo. Kaj vi scias, ni devas melki la bovinojn, suĉigi la bovidojn, do, venu min helpi, ĉio muĝas en la stalo.

Petro: (*alvenante kaj ridegante*) Ha, ha! Mi scias, vi faris ĉiom! Ha, ha! Sed nun mi scias, mi vidis, nun mi scias, kial vi ellitiĝas tiom frue, ha, ha! (*Li serioziĝas, la rigardo fariĝas fiksa kaj vigla.*) Mi aŭdis vin ambaŭ apud la barilo. En mallumo susurantaj vi restis duonhoron, koro ĉe koro atendantaj. Iom poste, senbrue, kiel pekantaj fantomoj, en la porkejon vi ŝoviĝis... Ne diru ne, ne plu neu, mi vidis vin! Mi ĉiam tion sentis, kaj nun, sen spiono, mi malkovris, ne eraris, erari ne povas mi...

Ŝi: Petro, mi petas, ne estu stulta, vi scias, ke mi elliris nur por prilabori miajn ĉiutagajn taskojn, por preni pajlon, akvon, lignajetojn, stipojn... Vi scias, ĉu ne?

Petro: (*Li rigardas fikse el la pordo sur la ŝtuparon.*) Mi scias... mi scias...

Ŝi: Ne rigardu tiel emfaze tiujn paŝaĵojn, nenion misteran ili enhavas, estas viaj, hieraŭaj, kaj miaj, kaj tiuj de via patrino, vidu ili ne estas tute freŝaj!

Petro: ... Ili estas tamen tiom ampleksaj, kaj la plan-daj desegnajoj strangaspektas en la koto.

Ŝi: Ne tiom absurde cerbumu, vi priridigos vin. Venu manĝi, poste ni iros labori, kune trankvile. Aŭskultu kiom la brutaro bleke senpacientiĝas! (*Li hezite ellasas la sojlon, paŝetas al la tablo kaj ekparolas pli akre, sed kiel plenkonscia homo.*)

Petro: Sed mi vidis! Diru, kiu estis kun vi apud la barilo!

Ŝi: (*Ribele, senpacience*) Jes, jes, estis bela junulo, kavaliro. Kaj mi ĝuis, ĝuadis, adultis, amoris, amoris! Jen, ĉu vi estas kontenta nun? (*Li konscias la mokon kaj ekhavas pli normalan sintenon. Li sidiĝas ĉe la tablo por manĝi.*)

Jen via manĝaĵo, gustumu kaj lasu viajn entojn, obsedojn.

(Li atendas kaj reripensas dum la edzino eliras. La bubo ludetas per paneroj. Petro ekmanĝas kaj tuj, longe flaras la laktokafon.)

Petro: Strange gustas ĉi laktokafo... gustas kiel, kiel... kvazaŭ bruligas la ezofagon... amaras, jukas, adstringas, kiel acido! Diru, Giĉjo, kion metis via patrino en mian bovlon, ĉu vi ne vidis?

Giĉjo: *(Naive, distrite)* Ŝi metis kiel ĉiam, Paĉjo, varman lakton kaj kafon, kaj panon kaj sukeron, kaj ĉio estis preta! Ankaŭ mi sciis prepari matenmanĝon, ĉu ne?

Petro: Ĉu ŝi ne iris al la murŝranko... ne prenis boteleton, paketon de tiuj pulvoroj, farunoj... vi scias...?

Giĉjo: Ha, jes, paĉjo. Panjo prenis la saketon de stimulaĵo por la porkidoj kaj, ĉar la reston de la faruno ŝi ŝutis en la sitelon, mi ricevis la paperpoŝon kaj en ĝin mi blovegis, blovegadis, poste mi frapetis kaj tuj ĝi kreviĝis... Vere, ĝi ne estis solida, ĉu ne paĉjo?

Petro: ... kaj ŝi metis la reston en mian bovlon, kun arseno, ĉu ne?

Giĉjo: Ho ne, paĉjo! Panjo metis la farunon en la trogon de la porkidoj... *(ridetante)* ... ne en vian bovlon!

(Petro ĉesis la manĝadon kaj fiksokule revadas. La edzino revenas laborrapidante.)

Petro: *(Al la edzino)* Kion vi metis en mian manĝaĵon? Ĝi gustaĉas, kaj ĉio enfajrigas mian stomakon.

Ŝi: Per kio vi volas ke mi preparu ĝin?... kiel ĉiam, lakto, kafo...

Petro: Ha, mi ne scias! *(kolere)* Tiu gusto, tiu gusto!... Vi celas mian malaperon, mian morton, vi volas veneni min, vi volas ne plu vidi min, min malamegas, vi deziras vian liberon en adultado, tutan liberecan ĝuon... liberon! *(Li ekstaras kun la bovlo en la mano kaj ĵetas ĉion al la direkto de la edzino. Ŝi kaj Giĉjo esploras.)*
Nu, jen via libereco, via amorado, via krima agado, jen sufiĉas!

Ŝi: *(Irrante preni la bubon.)* Mia dio, kia rabio! Mia dio, kie la kulpo, kion ni faru, kion ni faru, Giĉjo, mia Giĉjo!

(KURTENO)

Sceno 2

(Sama ĉambro; Petro sidas ĉe la tablo silenta, kaj reve, fikse rigardas al la pordo dum la edzino laboras.)

Ŝi: Petro, vi sufiĉe revis, vi devas hodiaŭ plugi la marnan kampon, estas la epoko por plantadi la terpomojn, kaj neniu agro estas preta, ni terure prokrastas ĉi-jare, ĉu vi aŭdas min?
(Li daŭre revas, ne respondas.)

Ŝi: *(al si mem)* Estas kiel se mi kantus, kiel se mi konversacius kun la muroj. Ĉu mi devas mem iri, mem plugi, mem kuiri, mem fari ĉion, pli ol mi povas, por daŭre ĝui tiun martiran vivon?... Se mi povus kuraci, kuracigi lin, normaligi tiun teruran staton! Sed, ĉio ebla, pova estas jam farita, provita; miloj da drogoj, piloloj, siropoj kaj «elektroŝokoj»... por kio, kial? Ha, kompaktinda mondo!

(paŭzo)

Ho, se mi povus revidi tiun drinkulan praavon! Se mi povus lin renkonti, revivigi, mi plezure masakrus lin, murdus lin tuj... Nu jes, mi donacus alkoholon, vinon, putinojn, ĝuon, ĉian ekstazon, mi regalus lian diboĉemon. Nun

estas vi, mi kaj ĉiuj samgeneracianoj, viaj filoj, ankaŭ eble, kiuj pagas la ekscesojn, la litrojn da drinkaĵo kaj la tutan krimaĵon lian... Ha, se mi tenus tiun mortintan maljunulaĉon, kiom plezure mi strangolus lin, ĝis kiam li fariĝus... blua, ruĝa, verda, nigra, putra!... *(paŭzo)* Malracio, malsaĝo homa, jen via rezultato, via daŭra produkto!

(Ŝi montras la edzon ĉiam fikse revantan.)

Kial inokuli al vi kuracilojn, homoj, vi mem kreas viajn suferojn. Generacio post generacio enradikiĝas kaj ampleksiĝas via kreita veneno, dum via spiro, en stertoro, anoncas dekadenco de l' fiziko kaj moralo. Vi parolas pri eduko kaj etiko, statuigas viajn sciulojn; la dimanĉojn, ja preĝas vi kun emfazo antaŭ ĉi lumo de l' perejo. Kaj via volo, via konscio kaj konscienco? ĉu utilas scienco, filozofio, viaj ismoj, se vi, homoj, post ceremonia juro kaj promesoj, denove dronas en la maro de la avideco kaj ĝuemo? Homo, ĉu vi vere bezonas fumi, drinki, bordelumi? Ĉu tiom da mono por vi estas nepra, ĉu al vi helpas subaĉeto kaj perfido? Kial vi leĝigas viajn sintenojn por, poste, tiel detruu vin? Ĉu vere, homoj, vi paŝas sur la ĝusta vojo, sur la vojo de l' feliĉo?... Mi dubas, mi tro suferas, provas vin kompreni. Ho ve, naŭzigas min viaj teorioj, viaj statutoj kaj statuoj; mi malamas viajn doktrinojn, viajn diojn kaj moralojn. Jes, mi volus spiri, spiri libere, ne pensi... ne senti la mankojn... la mankojn, kiujn vi kreas. Sola sub la suno, volus mi paŝi, senti min en harmonio kun la

naturu kiu min kreis... en simpleco, sen artifikoj... mi volus admiri, for la turmentoj, la formiĝon de mia kara fileto, ĝis kiam, vera homo, bela homo li fariĝu... kaj... dezirus mi, ke ĉiuj homoj venu, kiel fratoj sin amantaj... puraj... tute simple, tute nature, en tiun grandan rondon, kiun mi volus nomi socio! Mi dezirus, ke ĉiuj estu jetintaj ĉion koruptan, kaj ke ĉiuj egalaj, nudaj, fortaj, ili unisone suĉu en harmonia feliĉo, la sukono de la tero, de l' ĉielo, de la saĝo...

(Post momenta revo, sin turnante kaj montrante la edzon.)

Ho ve! Malracio, jen via rezultato!

(Li subite eliras la fiksan revon dum la edzino foriras.)

Petro: Ha jes, plugi la marnon!

(KURTENO)

Sceno 3

(Sama salono. Petro staras ĉe la sojlo, sola.)

Petro Iri labori, jes, tre facile, la plugilo, la erpilo estas pretaj, ĵugi kaj jungi la bovinojn ankaŭ mi povas... sed mi timas. Antaŭ ĉio mi volas min ŝirmi en la kelo, estas tro danĝere ĉi tie, la aviadilojn tondre alproksimiĝas kaj pafas, pafadas!... Kie estas mia edzino, mia fileto, ĉu bombo jam ilin neniiĝis? Giĉjo, Giĉjo!...
(La edzino alvenas.)

Ŝi: Ĉu ni iru? Kial tiu mieno? Kion vi havas tiom subite?

Petro: Atentu, jen bombo, jen bombo... la fajro kuradas, kuregas, atingas nin, atentu, atentu!...

Ŝi: Ne, mia kara, ne estas fajro, nek bombo. La milito jam finiĝis, la venonta ankoraŭ ne komenciĝis. Ĉirkaŭ ni regas komplete silento. Ĉio estas nura imago, iluzio via, kredu min, restu paca!

Petro: *(Ĉiam fikse, tremete.)* En la fundo brulas niaj rikoltoj, mia tritiko detruigatas en flamoj centmetraj, ĉio estas ruĝa, ĝis ĉi tie sentiĝas la varmo; la fumo, dense kaj vortice nigrigas la ĉielon, kie

akrobate kaŝiĝas aviadiloj... Flugmaŝinoj obstine nin minacas, rigardu, rigardu! Mia tuta posedaĵo neniĝis, en ruino, en ruino!...

Ŝi: (*Ŝi prenas lian brakon.*) Petro, mi petas, kvietiĝu. Ĉio estas iluzio, eĉ ne impresu, ne mizerumumu kaj venu kun mi labori, estos nur ni, ambaŭ, nur kune en plena silento.

Petro: Mi ne povas, mi ne povas... La najbaro, tiu ĵaluzulo, hieraŭ ekinstalis mitralon, mi vidis, li spione restas en la hangaro, aŭ sin kamuflas en la deponaĵo kaj, kiam mi eliras, li premas la terurajn ĉanojn, la kugloj ĉirkaŭas min, certe li mortigos min, jes, min mortigos, volas mian haŭton... cetere, tion li jam diris!

Ŝi: Kial tiom pripensi, kial obsediĝi, ĉio estas kvieti ĉirkaŭ ni. Ja, la najbaro, iam bastone, kruele vin vundis, sed tio estas malnova kvirelo. Daŭre la ĵaluzo rodas lin, li envias vian bienon, tutan farmon, sed li ne povas pafi, ne rajtas mortigi vin. (*ridete*) Pensu, en nia sociorganizo estas policistoj, tiel ke li mem, tuj estus mortigata, do, vi vidas, ke ne estus tre utile por li, eĉ sen la minimuma avantaĝo, se li atencus al via vivo. Lasu la akrecon kaj ĵaluzon de tiu sterkulo, konsideru lin kiel malindulon, neglektu lian ekziston kaj diru nenion al li, li rapide kapitulacos; ne timu, venu kun mi.

Petro: (*Atendas iom.*) Mi ne povas, vidu lin, li sin kaŝas malantaŭ la fojnostako kaj pretas, pre-

tas... mi ne scias, mi ne volas morti, mi ne volas, li jam tro bategis min kaj nun la fusilon li ŝargis!

Ŝi: (*senpacientiĝas*) Jes, jes, sed nun ĉio estas for, ĉi tion ne encerbigu, ne aldonu al via malsano, restu do kvieti, mi petas, vi ne estas en danĝero, mi asertas al vi.

Petro: Ĉio pafas, pafadas, tondras! Nigra ĉielo pezas pli kaj pli, premegas nin... Kaj, jes, tiu aĉulo profitas la bombardadon, tiel, mortigante min li ne estos kulpigata... la kulpanto estos la milito. Nepre li celas min, volas min krevigi, li diris, kriis tion al mi... Mi ne volas bombon, ne deziras kuglon... mi ne volas, ne plu volas batali... ne volas!...
(*Li kaŝas al si la vizaĝon dum li provas eltiriĝi el la edzino.*)

Ŝi: Petro, mia karega, mia tre kara malsanulo, venu kun mi al la kuracado, venu. Vi ricevos injektojn, bolusojn kaj tiel plu, kaj eble la virusoj de via kara avo malaperos... intertempe, suferu kaj suferigu!

Petro: Tamen, mi ne estas malsana, mi vidas, ne frenezas! Ha, mi ne volas, ne volas!...

(KURTENO)

FINO

VIKTIMOJ

Personoj: **Panjo:** La malsanulino.
La filo: Severmiena, aristokrata junulo.
Alino: La servistino.

Scenejo: *La scenejo konsistas el du partoj: unue, dormoĉambro kun lito kaj simplega meblaro, en angulo etaĝeroj plenaj je libroj. La dua parto konsistas el koridoro komunikiĝanta kun la ĉambro per pordo; aliflanke, fenestro.*

Sceno 1

(Panjo kuŝas, la filo ĉe la lito sidas kaj serioze legas, ĉirkaŭata de pluraj silkpapere kovritaj volumoj.)

Panjo: (*ĝeme*) Mia dio de l' ĉielo, mia dio de l' ĉielo!... Kial tiom suferi? Kion malbonan mi faris? Ĉu tion mi meritas? (*ekplote*) Neniam plu mi resaniĝos, neniam plu!

La filo: Panjo, pacienca vi restu, la tempon, kuraĝe lasu fluadi, ĉu ne! Venos ankoraŭ bonaj horoj por vi.

Panjo: Mi volas morti!

La filo: (*akre, lasante la legadon kaj forirante*) Se vi komencas blasfemi, sakri, larmadi kaj ĝemadi, mi tuj foriras.

Panjo: (*sola, malgajege*) Neniu plu amas min! Mia edzo de jaroj min forgesis; mia filino neniam miajn konsilojn akceptis, ŝi preferis izoliĝi en sia propra dekadenco, resti en memstaro, ŝi diris... Kaj tiu filo volas domini, ordoni, postuli... Ĉu ne estas mi finfine la dommastrino, la patrino ilia? Ne, nun novaj konceptoj volas

regi nian mondon! Ho! kiom mi estis turmentata de tiu filo, kiom da batalo por ioma akordiĝo... (*Firme*) Nun de jaro malsanega, mi estingiĝas. Tiu kancero vivanta min rodas, glutas miajn fortojn, mian ekziston tutan... (*ekplote*) Min. (*Pli nature*) Tamen mia kara fileto estas tiom klera, tiom scia... Eble li ne malpravas, eble liaj teorioj kunportas la veran lumon por nia eterna feliĉo?... Kara filo, li elspezas sumegojn por mia bono, por mia sano, por mi... por mi... restas apud mi... (*preskaŭ ride*) por mi!... (*paŭzo*)

Jen mi malsatas, sed neniu kun mi estas, la deĵoro tro tedas, ĉu ne?

(*Ŝi senpacience, insiste sonoras, dum la filo kure alvenas.*)

Donu al mi buljonon el kokinaĵo, kaj dume preparigu prunsukon kaj sagukaĉon, sed restu kun mi, ĉar naŭzon mi eksentas, mi nepre vomos.

La filo: Jes, panjo karega! (*Li eliras.*)

Panjo: Nu, jes, miaj fortoj stompiĝas... kia trista senpoviĝo: ekstari mi ne plu kapblas, mi anhelas... (*plote*) eksvenas je la unua movo... (*Dum la filo revenas kun plena taso, ŝi seke lin alparolas*) Rapidu! Mi mortas! (*Ŝi ekgustumas kaj tuj grimacas.*) Estas tro varma kaj mankas salo! (*Ŝi naŭziĝas.*) Mi ne rezistas plu, mi ne plu povas!

La filo: (*Tre serioze kaj pie*) Kvietigu viajn nervojn! Ne ribeliĝu, estu fida je via spirito! La spirito regas nin, tial se ĝi estas paca. Nia fizika korpo sekvas la spiritajn statojn kaj eniras progresive bonan serenon beaton. La spiritaj potencoj, kiuj je ni sentiĝas, estras la edenan paradizan bienon. Do ne forgesu ke la eterna feliĉejo estas por ni atingebla nur se nia animo la gracon meritas... La sanktaj skribaĵoj...

Panjo: (*plote kaj interrompe*) Mi tro suferas... mi volas morti!...

La filo: (*akre*) Ĉu vi ĉesas vian pekadon? Ĉesu!

Panjo: (*pli kvieti*) Mi ne povas plu ekstari, mi ĉiam stumblas... Nun mi plu kapblas nek urini nek feki sola, vi... iu devas min subteni, helpadi!... Kia terurajo!...

La filo: (*tre serioze, aristokrate*) Ha panjo, tio ne estas la rolo de fraŭlo kiel mi. Estus vere tro maldece, malkonvene, pensu pri mia reputacio!

Panjo: (*plote*) Jes, ja, mi scias, filinon mi naskis, sed nun ŝi pli amas la edzon ol min, ŝi fuĝis kun li... (*postule*) Voku Alinon!

(*KURTENO*)

Sceno 2

(En la malsanula ĉambro, Alino kaj Panjo.)

- Panjo:** Ĉu vi havas miajn sukojn kaj dekoktojn?
- Alino:** Sur via tableto, ĉe via lito, pretaj ili estas je via dispono.
- Panjo:** (*ĝeme*) Bone... Vi konas mian tre bedaŭrindan station, mian kvazaŭan senpovecon, tial, nun, vi ĉiam helpos min por miaj bezonoj, ĉu vi komprenas?... Sed atentu, restu deca, ne rigardu min tro!... (*senpacience*) Respondu!
- Alino:** (*ĝene sed firme*) Certe, sinjorino, mi ne rigardos viajn gluteojn... (*ironie*) se tio maldecas...
- Panjo:** Ĉu vi ne povas paroli pli respektive? Vi, la servistoj, ĉiam estas groteskaj, senedukaj, kiel hundoj... kiel via tuta medio!
- Alino:** Jes, sinjorino, kiel nia hunda medio...
- Panjo:** (*ĝemkolere*) Ne respondu! Laboru! Tro da polvo sub la lito kuŝas! La vitraĵoj maldiafaniĝas, lavu ilin... Ha, kiom mi suferas! Neniu min

helpas! Mi vive estas manĝata... Kaj kial dio min forlasas?... Nu, laboru, faru ion!

- Alino:** (*timeme*) Jes, sed iam vi diris al mi, ke je tiu horo mi povas eliri, lasi mian deĵoron... Mi frekventas, kiel mi klarigis al vi, kurson pri flegado, mi ne povas foresti, ĉar mi fiaskus je mia entrepreno... Cetere, mi ankaŭ al vi profitigos mian lernaĵon por mildigi viajn suferojn.
- Panjo:** Jes, al mi, kiam mi estos kadavriĝinta; nun ĉiuj volas esti sciuloj, eĉ la servistoj... Kaj ne labori, ne peni intertempe, Alino, restu ĉi tie, ĉar mi ne povas resti sola kaj mi bezonas tre baldaŭ mian injekton. Mia kapo estas kvazaŭ pistita je doloroj... (*plore*) mi ne plu povas rezisti!
- Alino:** (*pripenseme ordigante la litaĵojn*) Bone, Sinjorino! Apud vi mi restadu!...
- Panjo:** Mi tro suferas!
- Alino:** Estas tiel. Ni naskiĝis por suferi nian vivon kun ĉiuj ĝiaj voloj, por esti viktimoj de ĉio nin ĉirkaŭanta, jes, de la vivo mem, de la morto, de ni kaj de la aliaj... de iuj spiritoj, dioj, moraloj, leĝoj kaj antaŭjuĝoj!
(*paŭzo*)
Verdire, iel ajn estas niaj sociaj rimedoj, antaŭ la malsano, niaj helpiloj estas por ĉiuj samaj kaj preskaŭ nulaj, ĉar ofte eĉ la mono restas vana... Ĉiel, se ni devas morti, ni nepre malaperas; kiam iu kancero nin atakas ĝi estras

nin ĝis la fino, eĉ se ni amegas la vivon, eĉ se ni estas reĝo, servistino aŭ grafino...

(paŭzo)

Kaj, en ĉiuj cirkonstancoj, ni fervoras al vivo!
Nu, jes, sinjorino, malmulton por vi mi rajtas aŭ povas fari. Ĉu vi volas fortan injekton?

Panjo: (plore) Injekton ne, tiuj morfinaĵoj premas tro la kapon, mi ne plu konscias, ili venenas min, min rapidege mortigas!

Alino: (malrapide konvinke) Nu, bone, se vi preferas suferi, se vi amas la vivon ĝis tiu grado!... Persone, tute inter ni dirite, se mi scius ke neforigebla suferado, post nelonge portos min en la tombon, mi tuj, sentime, preferus trapiki mian koron per bela ŝtala klingeto, mi helpus al mi kaj ankaŭ al multaj aliaj... Sed... (Ŝi eliras, dum panjo ekploras.)

Panjo: Estas tiel: mi malhelpas ĉiujn, ĉiuj deziras ke mi malaperu, ke mi mortu, ili min mortigas, jes, mortigos... tre rapide min forigos... (Ŝi eksingultas.)

(KURTENO)

Sceno 3

(En la ĉambro, meznokte. La filo, palega, laca, drakone sidas apud la lito kaj legas. La malsanulino forte anhelas.)

Panjo: (plore) Mi deziras la morton, donu fortajn dozojn!...

La filo: (severege) Panjo, mi jam klarigis al vi, ke vi neniel rajtas akceli la morton. La leĝaro tion ne permesas je mia flanko. Kaj nia homa devo estas vivi! (pie) Plie, mi deiale eksplikis, ke la spirito ne povas tiel abrupte esti disigata de la korpo. Okazus tro granda ŝoko je tiu spirito, kio estus grava manko por via venonta reen-kamiĝo... Do vi bonvolu sekvi la dian volon!...

Panjo: Dio! Dian volon!... Kiu povas fari al mi la injektadon, ĉu Alino en ŝia ĉambro estas?... Se ne, vi mem devas...

La filo: Panjo, mi petas, vi ne ignoras, ke tio por mi ne konvenas. Cetere, al tiuj taskoj ne akomodiĝas mi. Nur vidi la nadlon kaj haŭ!... (Li mienas tremete.) Alino devas!

Panjo: (sufoke) Ŝi rapidu! Mi mortas!

(*La filo eliras.*)

(*Ŝi plore.*) Mi sentas ke mallonge mi vivos. Neniam plu mi vidos la mondon, ne plu iros en la ĝardeno, ne plu bakos bonajn tortojn, sufleojn, ne plu vivos... kaj mia animo, kie estas mia animo?! Panjo, Panjo mia, mian animon feliĉigu!... Dio mia, miajn pekojn pardonu! Mia dio de l' ĉielo, Dipatrino, preĝu por mi, savu min el la infero!... Mi asfiksiiĝas! (*preĝe*) Nia patro en la ĉielo, via regno venu, pardonu niajn ofendojn, kiel ni pardonas niajn ofendintojn, ne lasu nin je la pekoj, sed liberigu nin el la malbono... Tiel estu!

(*La filo revenas.*)

Panjo: (*al la filo*) Mia filo, mia karega filo, savu mian animon!... Alvoku la pastron, benigu min! Donu mian rozarion, la krucifikson, savu min el la infero!... (*plore*) Savu min!!!

La filo: Jes, panjo, mi asertas al vi, ke via spirito estas sana, morgaŭ, laŭ via volo, ni venigos la pastron... Intertempe, ni pie nin dediĉu al la mondreĝo!

(*KURTENO*)

Sceno 4

(*Samaj scenej-aranĝoj. La malsanulino, kaj la filo ĉe la lito, silente preĝas. Alino, en la koridoro, apogita je la fenestro, pense rigardas al la nokta ĉielo.*)

Alino: (*reve al si*) Kial tiu senlima firmamento, senfine damaskenita, flagradas tiom inside ĝis tiu ĉi tero mistera? Ĉu tiu grandioza lukso kapablas efektive radii dian lumon? Kie fontas tiu daŭre instruata, dia riveloj? Kie fluas reale la nemezurebla, dia bonkoreco?... Nenio je miaj okuloj, el la ĉiela volbo aspektas dia, ĉio tro vastas por mia rigardo mikroskopa... Mi scias, ke polveron mi identas, tial la nokto, por mi, homo, eterne belas... sed neniel al mi diktas konduton!... Ĉu konduto ne estas io spontanea, entenata en ni, en nia esto, kaj, eventuale modlata de nia rezono?... Kompreneble, mi, servistinaĉo, sed finfine homo, pli aŭ malpli samkapabla kiel ĉiu mastro kaj reĝo, ne pretendas solvi la kialon de pensado, vivo kaj agado, tamen sen filozofiadi, mi aŭdacas aserti, ke la misteroj, konfliktoj kaj ceteraj fenomenoj en niaj ordinaraĵoj, estas kreitaj nur de ni per tro elasta pensado nia: Ni estas

niaj propraj viktimoj. Niaj viktimoj pro nia malobjektiva konsiderado...

(Ŝi daŭre pensive rigardas al la ĉielo.)

Pro niaj edifoj, instruoj malnaturaj... por ni ĉio estas nura ento!... Kaj, ni kravatton uzas, fetiĉas, mienas fierege sub niaj moralaj jugoj, subigas kaj subiĝas leĝe por nutri avidojn kaj egoismojn. Ni timas neniigi kaj diojn alvokadas ĝis la mortosoĵlo. Ni preparolas civilizon, scienccon ditirambas dum antaŭjuĝoj nin envolvas!... Kompatindaj viktimoj!... Viktimo! Ĉiu surtere, je l' sudo je l' nordo, en tiu domo, estas viktimo, viktimoj de la viktimoj kiuj viktimas... Ŝi en suferego, viktimo de la malsano, viktimo de la egoismo kulturita en ekzisto malegaleca, viktimo de la mistiko kiu al ŝi celas klarigi la nekompreneblaĵojn, viktimo de la socio, kiu juĝe kaj leĝe konservas ŝin en suferego, kulturis en ŝi eĉ kontaĝan peston, viktimo kiu viktimigas la sklavajn servantojn, kiuj vane deĵoras je tiaj egoistaj putriĝantaj korpoj. Viktimo, li, la filo, de la samaj esoteraj spirititaj entoj, de antaŭjuĝoj, socia pseŭdopozicio, de moralo. Viktimo mi de tiuj viktimoj, de postuloj de la vivo, de socia organizo kiu devigas min laboradi je ies profito... Ni, viktimoj de ni, kiuj ne kapablas sin defendi kaj liberigi el tiu civilizaĉo kie, jes, la mortantoj valoras pli ol la vivantoj... Nu, ĉu la mortantaj pestuloj ne rajtas ĉiujn zorgejojn de la vivantoj kiuj, ili, ne devas revii pri ripozo, sed nur obsediĝi pri devo?...

(En la ĉambro)

Panjo: *(postule kaj subite ellasante la preĝan mienon)*
Injekton!!!

(La filo eliras el la ĉambro kaj alparolas Alinon drakone.)

La filo: Ĉu vi estas preta?
(Alino ne respondas kaj daŭre pensas.)
Kion vi pensas? Respondu!

Alino: *(kvazaŭ en revo)* Mi pensis, ke la mortantoj valoras pli ol la vivantoj.

La filo: Kion vi kuraĝas aludi?

Alino: *(Ŝi aspektas ankoraŭ en sia revo.)*
Ion ne gravan, krudan, el sonĝo eble, kiu devenas mian vulgaran medion... Sed ne timu, sinjoro, vi, same kiel mi, estas grandaj viktimoj... de niaj dioj, etikoj kaj kodaroj.

La filo: *(kolere, preskaŭ krie)* *(Panjo aŭdadas.)*
Kiuj ideoj estas tiuj? Kie vi legis tiajn anarkiist-ajojn, subfosajn argumentojn?... Mi ne toleros tion tie ĉi, ĉe mi!

Panjo: Kion ankoraŭ faris tiu senrespekta hundinaĉo?

La filo: *(emfaze)* Seneduke ŝi insultas nin, blasfemas kaj ribelas. Mi senprokraste forpelas ŝin el mia hejmo!
(Al Alino) Mi ne plu volas vidi viajn spurojn en mia loĝejo! Foriru!

Alino:

(iom time, sed ironie irante al la pordo)

Mi dankas vin, sinjoro, tiel eble mi estos iom malpli viktima. Kaj vi, ĉu ne, vi bonvole manipulu la pispotojn post viaj silkaj libroj, kaj senkravatiĝu, civiliziziĝu por mem apliki la morfinajn kaj mil vigligaĉajn injektadojn...

(Alino riverencas, dum la filo nerve tretas.)

(KURTENO)

FINO

NIAJ PATRIOTOJ

Personoj:

Flago: Vera, granda patrioto.

Atuto: Konscia, sed senskrupula monamanto.

Barbulo: Ĉiama ribeliĝanto.

Scenejo:

Simpla laboratorio pri elektronikaj studoj kaj provoj, situanta apud maŝinplena laborejo fone videbla. Granda labortablo kun tri seĝoj. Aranĝo laŭ plaĉo.

Sceno 1

(Atuto pense sidas. Li tenas ŝraŭbturnilon kaj rigardas jen malprecize, reve, jen al surtabla muntaĵo.)

Atuto: *(fajfetas) (rideme)* Gajni pli, pli da mono ricevi... monon... avanci... avanci ŝtupon post ŝtupo sur tiu senfina eskalo de l' gloro... *(ride)* Gloro ne!, ĝuo, mono, ni-diru... *(Flago eniras vigle, kun ilo en la mano.)*

Flago: Nu, kion vi faras? Nenion, kiel ĉiam! Ha, tio ĉi estas bona vivo, vera vivo de elektronika cerbo... kiu pensas!

Atuto: *(moke, ankoraŭ pripense)* Jes, amiko mia, mi pensas kiel elektronika cerbo, sed la diferenco kuŝas en tio, ke mi scias kial mi pensas, por kiu kaj pro kio mi agas... agadas... agados!...

Flago: Kia genia parafrazo!

Atuto: *(serioze)* Ne forgesu, knabo, ke antaŭ vi sidas via baldaŭa estro!

Flago: *(ride)* Via estro? Mia dio, se la fabriko, la tuta nacio estus regata de individuo kiel vi, nia

mondo plu ne ekzistus post kelkaj tagoj! (*serioze kaj preskaŭ krie*) La responso de reganto etendiĝas ĝis la honoro kaj grando de l' patrio, tial ni ne rajtas pri estrado blagadi, male, ni konsideru pie la regpovon, kiu celas nian prosperon de laboristo kaj dignon de naci-ano... Do, Atuto, vi bonvolu ĉesi vian petoladon!

Atuto: Kio, petolado? Kial vi tiel patose elspezas vian vervon? Ĉu mi ne havas kvalitojn de komandanto kaj karakteron de fabrikestro? Ĉu ne kapablas mi mastri, direkti same akurate kiel iu ajn el la lastmilita galopluna puritanaro? Kaj mi diru al vi, Flago, ke honoro de patrio aŭ alia, estas io tre relativa kaj fiktiva: ĉio revoluas ĉirkaŭ la mono...

(*Li ekhavas rideman mienon.*)

Mono sinonimas estron, patronon, komandan-ton, respublikestron, ministron aŭ laborist-estron, ĉar sen mono, jes, sen tiu mona avan-taĝo, neniu volus esti estro. Sekve, logike la gloro kaj honoro, ankaŭ de l' nacio, estas la mono... la mono, nur la mono... (*ridegas*)

Flago: (*kolere kaj forirante*) Mi preferas al vi ne respon-di, tia profanaĵo malpermesas ke oni vin konsideru kiel homo!

(KURTENO)

Sceno 2

(*Sama aranĝo. Atuto kaj Barbulo laboretas.*)

Atuto: Nu, jes, mi estas laca ofici kiel simpla elektroni-kisto, mi jam preskaŭ atingis la maksimuman ŝtupon de tiu hierarkio. (*ride*) Kion vi opinias pri tiu ideo: ĉu mi ne povus «laborestriĝi»?

Barbulo: Belega vorto, subluma sonĝo, sed ĉu vi ne vidas ke tia posteno por vi ne vakas?

Atuto: (*ironie*) Ja, tuj akirebla ne estas, sed, ĉu ne eblus vakigi iun stabejon? Mi diru, parteton de stabo?... Mi jam amikiĝis al la produktadestro... (*fieri*) Mi povus eble almontri mian teknikistan valoron, komplete, malkaŝe... kaj per aliaj rimedetoj, sen atingi nepotismon, troni je la supro de mia sopiro!

Barbulo: (*sincere kaj ribele*) Mi perfekte komprenas ke vi intencas viciĝi en la grandan familion de la «rampuloj» kaj similaj mallojaluloj. Vi pretas perfide klaĉi kaj mensogi, vanti kaj fanfaroni por atingi senvaloran ambicion, kiu eble de-prenos la malgrasan panon de daŭre ŝvitantaj

mizeruloj... Nu, ĉu via laborista rango estas tiom malhonoriga?

Atuto: (*ride*) Ne temas pri honoro, pri laboristo aŭ ne, mi celas ekskluzive personan plibonigon de mia financa situacio: Mono! Kaj tio per la minimuma peno.

Barbulo: Mi komprenas perfekte, ke via egoismo al vi forgesigas vian propran klason, kaj ke vi plezure fariĝos burĝ, ekspluatanto, kapitalisto, kaj senkompatate strangolos viajn proprajn amikojn.

Atuto: Tre bone, Flago ĵus diris ke mi ne indas esti homo, ĉar mi miksas monon kun patrihono, kaj vi, vi riproĉas min pro iuj murdemo, egoismo kaj similaĵoj. (*Li eklasas la stablon kaj foriras kun aparato en la mano.*) Mi ne volas debati en tiaj ideoj, mi posedas nun, unu nuran rapidan sed sufiĉan replikon: Mi ĉiujn idealismojn akceptos, sed kiam en komforto mi vivos, kiam la bifestko laŭbezone plenigos mian stomakon... Intertempe, mia «patrio», kiel diras Flago, estas la mono.

Barbulo: (*Sola, pensema, tenas sian kapon.*) ... Ni ja kirladas en ne solvebla problemo, kie la egoismo tro fiksiĝis en la individuo, neniu ankoraŭ sufiĉe sentis, ke la ego devas socie evolui, etendiĝi, por ke tiam, spontane, edifiĝu la ofte citita socialismo... Ĉiu ekspluatato sopiras al ekspluatado, kaj daŭre la plebano forĝas la lukson de la satrapo. Luj mistifikas la aliajn ĝis

hipnoto kaj plukas sian ĝuon en tiun nenormalan staton: Oni vokas al dioj, kantas pri patrioj kaj fluas la homsango, por la oro de la privilegiaj dikventruuloj... Kaj, rezignacie, la mondo vegetas...

(*Eniras Flago*)

Flago: Ĉu ankaŭ vi elektronike pensas? Ĉu ankaŭ vi sopiras al mono?

Barbulo: Tia ne estas mia koncentriĝo, miaj malfortaj ideoj vagadas kaj tute simple provas sondi la homan kondiĉon...

Flago: (*interrompe*) Estas tio, la homa kondiĉo, nia kondiĉo, la konservado de la nacia libero, de nia civitaneco... La gloro de nia standardo ĉiam devas senmakule flirti je la honoro de la patrio... Ni devas forpuŝi la malamikojn kiuj perfortas niajn konkeraĵojn kaj sabotas nian altan civilizon; nia raso devas konservi kaj plibonigi la nivelon ĝis nun atingitan, tial nepre kaj senprokraste ni devas grupiĝi je la spado de niaj gvidantoj kiuj daŭre predikas al bono kaj ekzemple oferas sian sangon je la servo de nia patrolando.

Barbulo: Ĉu ĉi tien ni devas ekkanti la marselejon²?!... Bedaŭrinde, mia kompatinda Flago, mi timas ke ni tre diference interpretas tiujn pensojn, ja male al via ĵusa ekzaltado, mi certiĝis ke ĉiuj

² Marselejo, ĉar la sceno okazas en Francio.

gloroj kaj honoroj, ĉiuj patrioj kaj ras-civilizoj restas vanaj klopodoj, kies bedaŭrinda konsekvenco, konscie aŭ ne, nur strebas al homa malharmonio, al senutilaj militoj...

Flago: (*interrompe*) Ĉu ankaŭ vi pretas rifuzi helpoj al via patrio, ĉu vi volas nei vian patrolandon? Ĉu vi ne havas amon por tio, kio ĉirkaŭas vin, kiu vin kreskigis kaj kulturis? Ĉu vi lasus vin forporti, enkarcerigi en koncentrejoj de torturo, for de via gepatra domo? Ĉu vi tolerus vandalojn en via hejmo, suferus vi ke ŝtelistoj, je viaj okuloj rabu viajn vivrimedojn?... (*kole-re*) Nu, respondu!

Barbulo: Ne, ne, mi ne estas renegato je ĉio ĉi tio, kaj vi preterpasas la ideon de patrio. Ja, mi aldonu ke mia patrio estas la tuta tero, ke mia nacio, patrolando, estas la planedo, kie ni vivas, ke ĉiuj homoj, ĉiuj rasuloj tie spirantaj estas miaj fratoj. Neniu homo normala celas iun ajn perforon, kreu min, nur la socia malharmonio kreas la konfliktojn, kaj nur individuoj misformitaj, tro avidaj, tro obseditaj, mistifikitaj kaj tiel erarigitaj rilate al la vera homa kondiĉo, kiel vi sin vidas premataj aŭ profitas je premo, kaj premas. Por mi, la milito neniel iam devas okazi, ĉar ĝi nenial praviĝas, do...

Flago: (*interrompe kaj furioze*) Do, azeno, perfidulo, vi rifuzas defendi vian teron, vian patrinon kaj viajn infanojn, vian tutan landon kontraŭ la sovaĝuloj, tiuj eterne rabemaj kaj atakemaj

araboj kaj flavuloj! Vi kuraĝus doni vian belan civilizitan patron kiel predon al la unuaj barbaraj atakantoj?

Barbulo: Ne! Por mi pafilo, kanono, bombo ne estas solvoj nek rimedoj, mi eĉ rifuzas ŝtonkatapulton kaj lancon: al milito mi neniam iros; kiel mi jam klarigis...

Flago: (*pli kaj pli furioze, trete kaj minace*) ... ĉesu, ĉesu, ne plu parolu! Neniam tiĉn mi aŭdis kaj neniam akceptos aŭdadi per miaj oreloj. Tiu, kiu dizertas la defendon de la patrio, de nia gloro kaj honoro, de niaj gepatroj, estas perfidulo, kaj tujan morton meritas. Se vi apud niaj gvidantoj ne kunbatalos por la libero, se je alvoko milita vi silentas kaj time kamufligas, ni eksplodigos vian kranion! (*krie kaj forirante*) Mi venos persone vin preni kaj tranĉos al vi la kolon!...

Barbulo: (*serene*) Kompatindulo!...

(KURTENO)

Sceno 3

(Sama salono. La tri personoj side laboretas.)

Atuto: (ironie) Nu, Flago, kiam vi enŝipiĝos cele al via Indoĉinio? Ĉu vi plue toleras la vjetnamajn banditojn?

Flago: (fiere) Jes, sinjoro, mi jam subskribis mian kontrakton, mi nur atendas la ordonon kaj same fiere kiel mi jam agis antaŭ kelkaj jaroj, mi portos pretermaren la gloron de nia raso, sub la emblemo de nia nacio... Sed, Atuto, kial vi tiel inside demandas min?

Atuto: Nu, mia kara, estas ĉar mi antaŭe volus havi la plezuron komandi vin sub la atributo de ĉi tiu fabriko...

Flago: (mire) Ĉu vere vi estas anstataŭonta nian inĝenieron? Per kia artifiko vi sukcesos je tiu avanco?

Atuto: (Cinike, dum Barbulo laborete pripensas.) Kompreneble, artifiko ne estas. Ĉiu baraktas, kiel mi iam al vi klarigis, por sia «patrio». Vi donacas vian sangon por forpeli la vjetnama-

nojn, konservi, kiel vi diras, la honoron de via kara patrolando, kaj tiel plu... Mi, tute simple, klopodas por firmigi mian situacion, por pli-altrangiĝi en la socia hierarkio, kaj tiel starigi mian propran liberan agadon. Kaj, evidente, same kiel vi, senkompate senkulpajn kapojn detranĉos, mi sentime la kolegojn pretas lerte kubutpuŝi... Mi aldonu ke mia metodo estas malpli kruela ol via!...

Flago: (koleriĝante) Mi petas, ke vi ne tiel parolu! Tiaj ironiegaj komparoj certe kondukos kinete, mian pugnon ĝis via malbela vizaĝaĉo, kaj tio nepre okazos antaŭ ol vi estu ĉefulo!

Barbulo: (firme sed ĝene) Mi petas, se mi bone komprenas, vi ambaŭ tre baldaŭ forlasos ĉi tiun postenon, vi ne plu kunlaboros, do almenaŭ estu amikoj dum tiuj kelkaj, lastaj minutoj, horoj... Vi...

Atuto: Ni scias, Barbulo, via filozofa barbo volas nun por ni oracii. Estas ja la fino, kiel vi diris, de niaj kunlaboradoj, tial ni provos viajn orakolojn kaj profetaĵojn lastfoje aŭskultadi... Bedaŭrinde, vi parolu sen katedro kaj sen mikrofono!

Barbulo: Mi tre dankas vian inviton. Vi perfekte scias, ke miaj stultaj ideoj neniel kapablas influi, modifi viajn sintenojn. Vi daŭre estos «niaj patriotoj», tial hazarda babilado, tia, kian mi nun povas okazigi, restos vana. Ĉar vi estas miaj amikoj, homaj fratoj, mi tamen rapide eksponos al vi

miajn sentojn rilate al viaj idealoj, kiujn vi ŝajne akurate sekvas.

Atuto kaj Flago: *(kune, kaj ridete sin rigardantaj unu la alian.) Ni aŭskultas vin!... (Ambaŭ ridetos kaj sin rigardetos unu la alian la tutan tempon.)*

Barbulo: *(solene, rege kaj ĉiam pli kaj pli emfaze)*
Kio estas patrio, kiu el vi povas ĝin difini? Certe neniu. Patrio estas abstrakta sento kiun oni en la socio, iom post iom, per edukado, instruado kaj variaj kromaj pseŭdo-fenomenosciencoj inokulas al vi, al ni. Per la patrio ĉiu homo de nia globo sin sentas kaj bedaŭrinde kredas pli supera kreitaĵo ol la landnajbaro. Nu, amikoj miaj, ĉu tia pravigo sufiĉas, ĉu senbaza kredo utilas kiel fundamento? Ĉu tiu sama, simila penso kiu ripetiĝas ĉe ĉiu de ĉiuj landoj, ne absurdigas la patriecon? Ja, se ĉiu patrioto de ĉiuj patrolandoj, pli prava, pli perfekta, pli supera sin sentas, kredas, estas aŭ ne, ĉu tio ne demonstras ke ĉiuj estas ja egalaj, sampovaj kaj samkretenaj, ĉu tio ne pravas ke unu nura nacio efektive ekzistas: La Tero? Kial la blankulo la negron subigas? Kial la blankulo la flavulo malamas? Tute simple: ĉar rasismo kiel patriotismo samfontas: mistifikado, la homaron sufokas...
(paŭzo)
Kaj vi, Atuto, monon, plian kapitalon vi celas. Ĉu rento ankaŭ ne estas artefarita, malracie kreita? Ĉu vere, persone vi ne vidas en ĉi tiu

fabriko kiel en aliaj, ke ĉiu maŝino mil brakojn jam ŝparas? Ĝi por ĉiuj kaj por ĉiu, por la direktoro kiel por la balaisto, abundan komforton povas produkti, ĉu tion vi ne konscias? Manufakturaĵoj senutile stokiĝas, varoj averias dum malsatas la produktantaj laboristoj, ĉar ties aĉetpovon rabas la kapitalistaj estroj. Ĉu riĉa laborestro manĝi bezonas pli ol juna laboristo? Kial ne laborfruktojn egalece distribui? Kial ne sin interhelpi, produkti pli, ĉu invento ne estas fonto por senfina bono? Ha, jes, restas individua fiero, orgoĵlo, avideco kaj avaro. Iuj dioj kaj ĥimeroj mistike nin premadas, dum certaj leĝoj nian liberon dominadas: Sed ni, homoj, ĉu la ĵugon ekskuadi ni ne povas? Ĉu ni, homecon en la kuro de la jaroj jam forgesis? Ĉu daŭre civilizo sinonimos al korupto? Ne, nian vivon konsideru pli konkrete, el realo ni ne glitu en la revojn de abisma fantazio, ni mildigu niajn instinktojn kaj impulsojn, sensulkiĝos la socio. Civilizo nepre regajiĝos, same por plebano la suno rebrilados, ĉar vortoj kiel proleto, burĝo, klasbatalo, mono kaj patrio, nacio kaj rasismo, mi esperas elmontriĝos nuraj verkoj kaj mesiaĵoj de la malracio.
(paŭzo)

Amikoj miaj, diskursi pli mi ne volas, ĉar tedi vin mi ne rajtas, akceptintaj miajn ideojn, ignorontaj miajn parolojn, mi deziras por via bono, ke vi restu en ĉiu ago veraj patriotoj de l' homaro.

(Atuto kaj Flago aplaŭdas kaj ridas, dum ili manpremas Barbulon, kiu restas iom konfuza.)

Flago: Kaj nun, antaŭ la disiĝo, por soleni la patrion kaj la lastan diskurson, ni iru trinki pindeton da bona vino!

Atuto: Vi estas unuafaĝe absolute prava!...

(Atuto kaj Flago sin prenas brak-ĉe-brake, ride kaj preskaŭ dance instigas Barbulon, kiu sekvas, mormmiena kaj pripensema.)

Atuko kaj Flago: (kante)

"Trinki glason estas tre agrable,
Ĉefe kiam oni estas du..."

(KURTENO)

FINO

ĈE LA BUOKRATEJO

Personoj:

Oficisto: Paperaĉulo de laborministreja sekcio el iu ajn ŝtato.

Proleto: Simpla laboristo.

Kapitalisto: Fabrikestro.

Scenejo:

Ĉambro de laborministrejo en urbeto. Meze, akcept-balkono. Ĉie amaso da polvaj dosieroj kaj leĝlibroj. Aranĝo kaj kroma dekorado laŭplaĉe.

Sceno 1

(La oficisto, maljuneta etiketeculo, ĉe paperplena tableto, turniĝadas kaj trafoliumas.)

Oficisto: *(sola, grumble)* La markado neniam korektas, centspesa marko pri edukado ĉiam forestas kaj neniu kapablas respekti la leĝon numero sep de la 15a de februaro de 1833, modifita de la artikolo 36, paragrafo 9, alineo C de la 27a de aŭgusto 1916, amenda de la dekreto 5 de la statutoj kaj linioj 39, 40, 41 de la 21a de decembro de 1953... Nuntempe neniu plu respektas, nek disciplinon, nek moralon, nur la monpunoj, la senfinaj procesoj obeigas la homojn antaŭ niaj konstitucioj pri la homaj rajtoj...

(paŭzo)

Nu, bona dio! Kiel nia mondo statas kaj kiel ĝi status, se kelkaj leĝoj ne estus tie por firmigi nian socion. Fido pereis, konscienco jam komplete ignoriĝis...

(Eniras la laboristo, kiu ĉe la balkono ekatendas dum la oficisto lin angule rigardetas.)

Oficisto: *(al la laboristo)* Vi bonvolu atendi, mi devas ĉi tie urĝe kontroli tiujn dokumentojn. Nenio

estas respektata, neniu akurate plenumas la kondiĉojn, oni vere mokas nin, la leĝon, la patron entute...

Proleto: Jes, sinjoro, mi atendas!

Oficisto: *(al si mem)* Folio 3, duplikato 7 de la protokolo... ĉiam same, malordo, nekompleto, fuŝitaj paperoj kaj poste oni plendas, riproĉas min, sed kiel do mi povas sekvigi la dosierojn en tiu ĥaoso de malbonvolemo, ĉu estas tiom malfacile trarigardi la 3451 paĝetojn de l' resumoj de la civila kodo? Ĉu ne eblas atenti la kelkcentan paragrafaron de la mark-leĝo? *(rigarde al la proleto)*
Oni ne plu konsciencan havas, ne plu!...

Proleto: *(ĝenate)* Sinjoro, ĉu al vi eblas, ke vi min aŭdetu? Temas pri tre rapida afero, nur kelkajn informetojn mi deziras kaj, bedaŭrinde, multan tempon mi ne disponas.

Oficisto: Ha, mi scias, rapida konsulto! Ĝis kiam vi estu ĉiom kompreninta, kun viaj komplikaj cerboj oni devas ripeti ĉion dum tri aŭ kvar fojoj!... Atendu iom!
(Iom poste la kapitalisto eniras kaj aliras la alian flankon de la balkono, dum la oficisto ekrigardas kaj spontane, lasante la paperojn, la balkonon alkuras.)

Oficisto: Bonan tagon, Sinjoro Fabrikestro, kiel vi fartas? Kiu bona vento, ĉi tien vin kondukis?

Kapitalisto: Saluton! *(rigardante al la proleto)* Ĉu vi parolis al tiu hundaĉo?

Oficisto: Ankoraŭ ne, kompreneble, Sinjoro Fabrikestro!

Kapitalisto: *(interrompe)* Bone, do estas pri li, li ne laboris kaj pretendas rajti al la salajro; la ino laŭdire malsanis kaj tiel plu, kaj tiel plu, vi scias, tiuj aĉaj ignorantoj neniel ŝatas peni kaj volas ĝui la belan vivon, kaj krome aŭdacas leĝe procesi min... Vi komprenas la situacion, kun tiuj fiuloj oni ĉiam devas atenti.

Oficisto: *(aprobe)* Certe, sinjoro, oni devas atentegi. Ili ne plu konsciencan havas, la leĝon komplete neglektas!

Kapitalisto: *(interrompe)* Ĝuste, la leĝo...
(Li traserĉas en la poŝo kaj eltiras spesmilajn monbiletojn kiujn li donas al la oficistaĉo.)
Do vi bone studu la kazon, versaĵne li babil-aĉos! *(forirante)* Mi revenos!

Oficisto: Dankon, sinjoro Fabrikestro. Mi analizos la situacion kompreneble. Ĝis la revido, sinjoro!

(KURTENO)

Sceno 2

(Sama ĉambro, la oficisto kaj la proleto.)

La proleto: (*senpacience*) Nu, ĉu vi finfine atentis pri mi? Cetere, nun vi scias pri kio temas mia klopodo. La fabrikestro verŝajne ĵus pro mi kaj pri la sama afero vin konsultis.

Oficisto: Pri tio ni tuj diskutos. Mi jam ekkonas la plendon. Mi pretigos la proceson kaj ni vidos la instruojn de la leĝoj por eviti ĉiujn konfliktojn kaj disputojn, ĉu ne?

Proleto: Evidente. Tamen mi supozas, ke tiuj leĝoj ne estos tiom favoraj al la riĉaj mostoj, kiel la oficistoj kiuj ludas per tiuj dekretoj, estas ...

Oficisto: (*mire*) Kion vi tiom inside aludas?

La proleto: Mi nenion aludas, mi nur konstatas, ke kiam oni estas riĉa magnato, kiu neniel laboras, la homoj sklave je oni rapidas, dume kiam mizere oni vivas kaj penadas galere, oni estas eterne forpelata kaj ignorata!

Oficisto: (*supere*) Mi preferas ne tro retenigi viajn parolojn, sinjoro. Ne forgesu ke ĉi tie subfosajoj ne licas, kaj ke vi staras en domo de la

justico. Ofendo al oficisto de la leĝo povus vin konduki ĝis la eŝafodo, gilotino aŭ elektra seĝo... La dekreto 35, folio B de la 7a de oktobro 1935 bonege pritrakas tiajn insultojn.

Proleto: (*flate*) Kiel mi vidas, sinjoro, vi perfekte majstras vian specialistan laboron, tial mi tre feliĉa estus se vi bonvolus citi, same kiel vi tion parkere deklaris pri insultoj, leĝ-referencojn kiuj sankcias mian kazon.

Oficisto: (*Tiam pli atenteme, li venas al la balkono.*) Kompreneble, tio estas tre facila afero, do vi bonvolu iom detaligi al mi la temon por kompletaj raportoj je via dosiero.

Proleto: Mi scias, ke laŭ la leĝo oni rajtas ricevi tutan salajron dum 10 tagoj je okazo de akuŝo aŭ malsano de la kunvivantino. Bedaŭrinde, mia edzino, tiel malsaniĝis ke, ĉar neniu alia ol mi povis ŝin flegadi, ĉe ŝia lito mi devis resti. Nun la fabrikestro neas la leĝon, volas absolute nenion pagi el mia salajro, kaj intencas maldungi min, kiel ekzemplon por la aliaj mallaboremuloj, diras li! Mi do volus, ke vi studu la aferon por ke ni sciu, kiu efektive deliktas: ĉu mi, ĉu la burĝo...

Oficisto: (*tre gravmiene*) Mi perfekte komprenas, tamen por ke mi akceptu la plendon, vi devas plenumi certajn leĝajn kondiĉojn... (*post momenteto*) Ĉu vi scias skribi?

Proleto: (*ĝene*) Bedaŭrinde, kiel infano mi jam devis laboradi, tial ne eblis, ke mi lernejon frekventu!

Oficisto: Tio evidente malsimpligas la situacion... jam tre komplika! Tamen ni faru tion, kion ni povu, ĉu ne?... Unue, vi devas por pagi la diversajn honorariojn de juĝistoj, advokatoj kaj notarioj, deponi provizoran kaŭcion de mil spesmiloj.

Proleto: (*mire*) Sed ...

Oficisto: (*rapide interrompante*) Ni diskutos poste, ĉiel, ĉiuj kondiĉoj estas devigaj kaj ilin preterlasi ne eblas, do, vi bonvolu rememori kaj al mi prezenti la jenajn dokumentojn, por ke vian dosieron mi malfermu:
– Tri naskiĝatestoj viaj, markumitaj per la markoj; eduko kaj sano de 100 spesoj, elektrigado de 200 spesoj; unu atesto pri bona konduto akirebla ĉe la policejo kaj kun markoj de enmigrado kaj koloniigado de 80 spesoj plus ŝtataj markoj de 50 kaj unu de eduko kaj sano; du certigoj pri profesia kapablo en la departemento de via faklaboro kiu sidas en la najbara urbo, kaj markumita per la 100-spesa marko de industrio kaj komerco kaj la 500-spesa de finanĉministrejo, akirebla en la bankoj. Vi ankaŭ bezonas tri fotojn, rekte kaj flanke filmitaj je formato 3x4 kaj ne pli ol unumonataj. Plie, mi preskaŭ forgesis, negativo pri impost-

ŝuldo havebla je impostoficejo; civitaneco, ricevebla en la urbodomo, kaj prokurrajtigilo je persono por vi findinda kiu povos subskribi la necesajn dokumentojn de via dosiero. Kompreneble, ni nepre bezonos ateston pri la malsano de via edzino, tiu ĉi devas esti subskribita de almenaŭ tri kuracistoj, kie almenaŭ unu estas oficiale rekonita de la justicministrejo kaj kie ĉiuj aliaj devas esti rajtigitaj en la koncernaj notariejoj.

(*Li rigardas la horloĝon.*)

Nu, jen, mia laborhoru jam de du minutoj estas for, pro vi mi malfruas. Vi revenu morgaŭ posttagmeze. Ĉio estas kombinita kun sinjoro Fabrikestro... Ne forgesu vian identecan karton, viajn militpapezojn kaj akton pri via edziĝo.

(*La proleto kvazaŭ ebria ekiras dum la paperaĉulo sin preparas por foriri.*)

Gis revido!

(KURTENO)

Sceno 3

(Sama ĉambro. La kapitalisto kaj la oficisto.)

Oficisto: (*ironie kaj supere*) Kompreneble, sinjoro Fabrikestro, li ne povos daŭrigi la proceson, liaj rimedoj tion ne permesos... Evidente, se oni volus funde esplori la kodaron, li ne malpravus, sed, sinjoro, vi perfekte scias, ke ĉiam restas nuancetoj de interpreto... ĉefe kiam oni estas analfabeta kaj devas iel cerbumadi...

Kapitalisto: Kompreneble, tute kompreneble. Tiuj mallaboremaj poltronoj ĉiam volas pli. Ili komplete rodas mian profiton, kun siaj manioj kaj ribelemo, tiel ke bona ekzemplo kiel tiu, montros, ke en mia fabriko la disciplino kaj obeo regas kaj devas regi. (*Eniras firme la proleto.*)

Proleto: Bonan tagon, sinjoroj!

Kapitalisto kaj Oficisto: (*kune*) Saluton!

Oficisto: (*senpacience*) Ĉu vi kunportis la dokumentojn?

Proleto: Ne, mi tre bedaŭras. Disponi pri tia kaŭcio estas por mi neeble. Plie tiuj dokumentoj, kiujn vi troige postulis, reprezentas unu monaton da laboro, jes tio estas tutmonata mizera salajro mia! (*ekkolere*) Vi ambaŭ perfide mokas, ekspluatas min, mian malriĉecon, vi estas nuraj sinekuristoj!

Kapitalisto: (*supere, ordone*) Atentu pri viaj paroloj! Daŭrigu tiel kaj vi vidos kiu el ni pekos pli! (*ridete, sarkasme*) Cetere, mi mokas nenion. Estas vi, kiu atakas min kaj vi ne volas vin leĝigi!...

Oficisto: (*ŝajne indiferece*) Tre evidente, mi nenion povas fari, se vi ne havigas al mi tiujn fundamentaĵojn... (*ride*) Kiel mi povus vin identigi, scii tion, kiu vi estas, kia civitano antaŭ mi staras!
(*Li eltiriĝas iom post iom en la ĉambrangulon.*)

Kapitalisto: (*superege*) Aŭskultu, laboristo! Estas pli bone, ke vi restu trankvila, ke vi ne kompliku vian vivon. Tio kondukus vin kaj vian tutan familion nur en plian mizeron, ĉar vi malpravas. Ne forgesu, ke en nia organizita socio estas disciplino, kiun oni devas akurate respekti, kaj neniel la komforto, la mono sen laboro venas. Viaj laborordonantoj havas seriozajn motivojn por tiel agi, por ordoni, ili responsas pri la fabriko, pri via propra vivo, pri ĉiuj laboristoj kiuj sen

fabrikoj ne perlaborus. La prospero de la tuta lando, la honoro de la tuta nacio de la regantaj estroj dependas... tial super ni, estas la leĝo kiu servas, harmoniiĝas ĉiujn por ĉies bono... Ni ĉesu!

(Li foriras.)

Ni ne perdu tempon! Ĝis reveno!

Proleto:

(post momento, disbatita) La leĝo... disciplino... respekto, bono... prospero... mizerio... Kiuj vortoj tiel sensignife vorticas je miaj okuloj blindigitaj? Ĉu freneza estas mi, ĉu mi perdis la konscion, mian penskapablon? Ordigi miajn ideojn al mi ne plu eblas sur ĉi tiu tero el kontrastoj. Ĉu vere tiu paperaĉejo utilas la laboristaron? Ĉu la leĝo estas io efektive rilatanta homan kondiĉon?... Mia edzino malsaniĝis... pro malsato eble, ĉu mi povas lasi ŝin senhelpa ĝis la morto, ĉu ŝi ne rajtas plu, leĝe al la vivo? Oni vokas al humaneco, al frateco, egaleco, libereco sur ĉiu piedestalo, sur ĉiu frontono kaj blazono fanfaronas... Nu, kial al ioma subteno, homa, humila apogeto, simpla animo ne povas pretendi? Ĉi tie regantoj, dungantoj, kaj leĝuloj kiel fialmozulon elpelas min, min konsideras kiel malpenema ŝtelisto, sed kial, kion faris mi, kie estas mia kulpo se riĉo min malfavoris? Jen, mi vivas en kabanaĉo sen minimuma komforto, li, la estro en palaco pavadas luksege ĉirkaŭata. Mi seninterrompe penadas, li duonjaron feriadas. Piede al la tasko

mi frumatene rapidas dum aŭtomobile la sinjoro promenas. Je la sesa ĉe la brua maŝino en infero ekstaras mi, dum li dilatante kaj parade, je la deka ekkontrolas, kritikas kaj komandas. Miaj buboj nudpiede, tuttage kiel sklavoj jam baraktas, liaj heredontoj dande doktoriĝas... Jes, jes, tio estas la leĝo, por ĉies bono... Mi ŝvitu ĝis stertoro dum profitu lia moŝto...

(emfaze al la oficisto)

Sed mi petas, vi leĝulo, se homo vi ankorau estas, ĉu tio estas ja humana kondiĉaro?... Paperaĉojn vi bredadas, parkerigas la dekretojn, pri statutoj vi vantadas, el kodo la sintenon kaj konduton kuraĝas diktadi, kun fido kaj amo, diras vi... post propra intereso, jes, vidas mi... Sed diru do, burokratulo, kies kodo estas ĝi? Kiu ĝin establis, tiu universala homa rajto al vivo, spontana kaj sama por ĉiu kaj ĉiuj, kie ĉiu individuo nuda sub la suno naskiĝas? Kaj nun, kiu bakis vian polvan kodaron? Respondu, parolu, ne hezitu!... Vi timas, ĉu ne? Do al vi mi diros, kiu leĝigas kaj tiel fuŝas nian harmonion, nian tutan socion: estas aviduloj kiel vi, la privilegiuloj, la nobeluloj, la kapitalistoj, la timemuloj, kiuj modlas, trudas la mizeron per tiaj artifikoj, per ĉiuj mistikoj, por ke neniu ribelu, plendu... Jes, tio estas via justico, viaj kodoj kie pulĉineloj kiel vi, mistifikitaj ĝis kretenigo pretendas regi la mondon per paperaĉoj markumitaj! Respondu nun, ĉu mi malpra-

vas, ĉu tiel ne estas? Parolu, hundaĉo, aŭ mi strangolos vin!...

Oficisto: *(timege)* Ĉesu... ĉesu, se ne mi alvokos la policon tuj!...

Proleto: *(interrompe kaj kolere)* ... Jes, nun vi pri polico ekpensas, kiel lasta elsavigilo, por subpremi la ĝenantojn, tiujn kiuj eĉ ne obeas la kodan voĉon! Nu, voku, mi neni-on por timi havas, ĉar tiel vivi apenaŭ povas mi, mian honestecon, mian tutan homecon viaj leĝoj perfidis, pro via tuta paperaĉejo mia homa digno hontas. Tamen vi kaj via tuta aparataro eĉ ne valoras kraĉaĵon de mizerulo kiel mi...

(Li prenas staplon de libroj kaj paperoj el la balkono, kaj ĵetas ĝin kraĉante al la oficisto, kiu fuĝe sin kaŝas en la fundon de la oficejo.)

Mi dankas vian afablan servon kaj jen mia provizora kaŭcio, sed kompletan pagon, ni, mi kaj ĉiuj proletoj, baldaŭ al vi kaj viaj sinjoroj fabrikestroj transdonos...

(Foriras.)

(KURTENO)

FINO